

AFRIKA REVUO

NOVJARA BONDEZIRO

de E. Burgler-Jezsö, Nederlando

Kara Verda Flamo en la nova jaro
Kresku, multobliĝu via legantaro.
Se venas rekompenc' laŭ la merito.
Ĝin donos la Dio al vi sen hezito.

Vi estas por ni kara, nia Verda Flamo,
Vin ĉirkaŭas nia tuta amo.
Kiu diras, ke via enhav' malriĉa
estas, tiu estas ja vere malica.

Kara Verda Flamo, laŭ nia impres'
Pli altiĝu iom la via abonprez'
Se vi nun aperos en formo presita.
Via valor' estos per oro pesita.

LA SOLA ESPERANTO-GAZETO
APERANTA EN AFRIKO

Asperas monate
Paraît mensuellement

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO de :

AFRIKA REVUO

Maroko, Casablanca, 5, rue Savorgnan de Brazza

Cef-redaktoro : Irène FINK

Administranto : Y. LEAL

(La manuskriptoj akceptitaj de la redakcio, restas ĝia propraĵo. Se oni deziras la resendon de neakceptitaj manuskriptoj, aldonu 1 internacian poŝtan respondkuponon).

PAGTABELO.

La abonkotizo por unu jaro estas 6 ang. ŝil., 15 internaciaj poŝtaj respondkuponoj, aŭ egalvaloro en aliaj valutoj. La monon se eble sendu direkte je nia adreso. El landoj, el kiuj oni ne povas sendi monon, pagu al ĉef-delegito de I.E.L. en via lando. (vidu 29-an paĝon).

LIBRO-SERVO de A. R.

Kun la mendo bv. sendi koncernen monon. Pagu per mono papera, sendebla en letero ; per internaciaj poŝtaj resp. -kuponoj aŭ rekte je nia poŝtĉekkonto n° (Fink) 111.75 Rabat.

Aldonu 10 % por sendkostoj aŭ 15 % kun rekomendo. Por la mendoj kiuj superas 1.000 fr.fr. ni ne kalkulas la sendkostojn. La internaciaj poŝtaj resp.-kuponoj devas esti ĝuste stampitaj de via poŝtoficejo. Pro ofte ŝanĝataj kursoj, ni donas la prezojn en angla monsystemo : 1 ŝilingo : 12 pencoj : 20 ŝil. : 1 fundo. Unu ŝilingo valoras : 24.-fr.fr.

JEN LA II-a LIBRO-LISTO :

	S.p.
Galerio de Zamenhofoj : Wiesenfeld	1.6
Kiel aranĝi kursojn k. grupvesperojn	5
Al Torento : S. Engholm	2.0
Amo en Jaro Dekmil : Ignokus. Bind.	6.6
Anstataŭa Edzino : Maxwell, bind.	6.0
Elektitaj Noveloj : Lu Sin	3.
Esperanta Legolibro ; Setälä	2.
Esperanto por Infanoj G. Gladstone	1.11
Cerik k. Teĵo : Toms	1.8
D-ro Dorner : Egerrup	8.
La Pastro en Vejlbeye : Blicher	2.3
La Trovita Feliĉo : Sekelĵ	0.9
La Morea Perlo. Simson	2.3
Iris : Henry't Sas	2.3
Sub vitra kupolo : Weddingen	2.3

	S.p.
La radianta Lotuso : Degreef	2.3
Du majstro-Noveloj : Storm. bind.	5.0
Jarmiloj pasas : Haefker bind	
Landoj de l'Fantazio : Jung bind	16.0
Pli ol Fantazio broŝ.	3.9
Vagabondo kaj Sinjorino. Bind.	6.0
Koro : Amicis bind : 10 ŝ. 6 p. broŝ.	9.0
Rakontoj por Geknaboj : Toscani	2.6
Sakludado : Glascosa	1.0
Historio de Kristo : Papini. Bind.	15.0
broŝ	13.6
Infanoj en Torento : S. Engholm	3.9
La multekolora libro	2.6
Cu vi scias ? Appleby	9
Leterpapero kun koverto (100) kun teksto : « Esperanto Lingvo Internacia »	8.0
Fontamara : Silone bind	7.0
La Hispana Tragedio : Last. Bind.	7.0
Homoj en milito : Latzko	7.0
Judoj sen mono : Gold	7.-
Kulio : Lulofs	7.0
Patroj k. Filoj : Turgenjev	7.0
La Ŝenlingvulo : Korolenko	7.0
Taglaboristoj : Kirk : bind	7.0
La Virineto en Bluo : Stuttard	3.0
La Tragedio de l'Homo : Madach. Bind	9.3
La grandaj filozofoj : Glék	0.10
Rusaj noveloj : Lermontov	0.10
De Muheddin ĝis Mundilatin	0.10
Tra Usono kun ruliĝanta hejmo	0.10
El la klasika periodo de E.	0.10
La Kongresaj paroladoj de Z.	0.10
La Kongresaj paroladoj (dua parto) Z.	0.10
La Avo : Pécöfi	0.10
La ĵusnaskito : Bengoa.	0.10
La Jubilea Kongreso 1912	0.10
La Ora kongreso 1937	0.10
Nordnordaj Fabeloj : Thézard	0.10
En la vagono : Sir jaev	0.10
La problemo de Lingvo Inter. Rozinjo	0.20
Rozinjo	0.9
El la Londona Skizlibro	0.9
Flugado Alimonden : Dodge	0.9
Patro k. Filo : Jovkov	0.9
(daŭrigo : sur la 39 paĝo)	

AFRIKA REVUO

Esperanto-gazeto por ĉiuj

ENKETO de Afrika Revuo

Unua Rezultato

Ni ricevis multajn respondojn je nia Enketo Generale ĉiuj legantoj insistas pri presigo de nia revuo kaj duonigo de formato. Kelkaj enhavas tre interesajn sugestojn.

Iu esperanta grupo en Nederlando, instigas nin aperigi pli ofte, ol ĉiumonate A. R.-on.

S-ro Burgler-Jezŝo skribas : « nature, ankaŭ mi apartenas al tiuj, kiuj prefere legus presitajn numerojn de la revuo, ĉar la teksto tre ofte estis malklara (en la hektografitaj numeroj de LVF. dum 1946, la Red.). Mi proponas, ne plialtigu la prezon pli ol 15-20 %-ojn. Mi pensas tamen, ke tiu sumo-proksimume sufiĉos por la presigo. Mi proponas bv. demandi la abonantaron, ĉu ili konsentas pri tio, ke la abonkotizo plialtigu. Mi pensas, ke per tio vi nepre havos sukceson ».

S-ro Matwiejczuk opinias :

« Antaŭ ĉio la revuo devas nepre esti presata.

1° Oni tenu la ĝisnunan formaton.

2° Al mi plaĉas la enhavo.

3° Oni enkonduku pli largan rubrikon por poezio ;

4° Pligrandigi rubrikon por literaturajoj ».

S-ro Bayard skribas : « Mi ricevis decembran numeron de LVF. La Enketo multe ekinteresis min, kaj jen mia propono :

Unue estus pli interese, ke la revuo aperu en duona formato de tiu en 1946 jaro, kompreneble kun almenaŭ dek ĝis 12 paĝoj. (Cu vi estas kontenta, kaŭze de 20 paĝa revuo ? la Red).

Due — La enhavo plaĉas multe al mi.

Trie — Kiel rubrikoj, mi dezirus trovi tiun pri tutmonda movado, kaj markoka socia vivo, krome laŭ mia modesta opinio, multe helpus al nia revuo, se en ĉiu lando niaj abonantoj proponus sin kie' perantoj de A.R. por kolekti abonkotizojn kaj abonigi ssmideanojn, krome ilia tasko estus sendi interesajn artikolojn pri iliaj landoj, komunikaĵojn pri E.-movado ktp. al la redakcio de A. R.

S-ro B.S. Ohana sugestas « : Pri la formato fiĉe oni povus elekti iun ajn, tio kio gravas, estas : ke la folioj ne estu sendependaj. Tamen taŭga formato, estus laŭ mi, mezformato, kie' tiu de Franca Esperantisto, ekzemple. Se estas absolute necese, ke oni utiligu formaton de 1946 jaro, pro manko de papero, almenaŭ ni duonigu ĝin ».

La peto de la pli multo estas illustri la revuon. Ni esperas kontentigi vin kara leganto ; sed vi devas nin helpi per abonigo de viaj E. amikoj, kungrupanoj kaj korespondantoj. Estas vere, ke la prezoj de klišoj estas treege karegaj, sed helpe de vi, ni povos realigi tiun problemon.

Do, pagu vian abonkotizon por 1947 jaro, se vi ne ankoraŭ faris tion kaj sendu al ni novajn abonantojn.

Kiel respondon al s-ro B. Ni turnas nin al vi, karaj samideanoj, kiuj estas pretas preni sur vin taskon de peranto de A. R. en via lando, sciigu nin pri via deziro kunlabori.

NIA ENKETO KONTINUAS.

Vi ĉiuj povas respondi je nia demandaro (kiun ni ripetas ĉi sube, precizigu

vialjn sugestojn. « **AFRIKA REVUO** » estas via gazeto, helpu nin fari el ĝi la plejinteresan kaj vivplenan revuon.

DEMANDARO :

La unua demando ne plu validas, ĉar laŭ deziro de la plej granda nombro de legantoj ni elektis la nunan formaton kaj presigas la gazeton.

2. Cu la ĝisnuna enhavo plaĉas al vi ;
3. Cu vi deziras ankoraŭ aliajn rubrikojn (se jes, kiajn ? Je kiu temo).
4. Kiujn rubrikojn plilarĝigi ? (daŭrigo je la 24 paĝo).

KURACADO

Ciutage okazas, ke blindulo, kiu dum jaroj vivis en mallumo vidpoviĝas. Ciutage iu okulkuracisto ree faras ĉi tiun mirindaĵon. Tio estas eĉ malgrandnombra konjekto, la nombro de blinduloj nur en Novjorko kiuj suferas kaj submetas sin je operacio estas poĵare 500. La operacio, antaŭe malofte, nomigas kornea transplanton.

La korneo estas la travidebla membrano kiu kurbigas antaŭ la iriso kaj pupilo, same kiel la vitro de poŝhorloĝo ; ĝi ebligas trapasi la lumon. Kuracistoj scias de post jaroj, ke eblas eĉ tranĉi malfermejon en korneo, kiu pro akcidento aŭ malsano maltravidebligis kaj en la malfermejo enmeti korneopecon prenitan el sana okulo ; tiel farante ili povis vidigi la blindulon. Sed la kuracistoj povis nur malofte akiri sanan uzeblan okulon. Ĝi devis esti prenita de iu, kies okulo oni estis divigita eligi pro vundo kiu tamen ne difiktigis la korneon aŭ de mortinto, kiu antaŭe, oferis sian okulon por tiu celo.

Do blinduloj atendantaj tian operacion, devis atendi timante dum monatoj, ĝis malofte ŝanco alvenis.

Nun ĉio ŝanĝiĝis, Grupo de novjorkaj hospitaloj, organizis la unuan okul-konservejon en la mondo. La hospitaloj petas permeson al la familianoj de jasmortintoj aŭ al la suferinto, de iu akcidento. Ciuj hospitaloj interkonsentis sendi la voloran materialon al centrojo, kie oni plenumas laŭvice la mendojn de okulkuracistoj.

Antaŭ nur unu jaro, tiu ĉi plano estis publikigita kaj la rezultato estis vere miriga. Multaj decidis donaci post sia morto liajn okulojn, kaj multaj oferis okulojn de morte-naskiĝintaj infanoj. La okuloj de infanoj

taŭgas same bone, kiel tiuj de plenkreskuloj, ĉar la transplantoj estas ne grandaj. Hodiaŭ la okulkuracisto, neofte devas prokrasti operacion pro manko de materialo.

La organizo anstataŭ esti nur novjorka, nun fariĝis tutusona, kaj transdonos okulojn al hospitaloj, kiuj petos la materialon. La organizo instruas pluaĵajn kuracistoj-specialistoj, ĉar nun ekzistas nur 20 kuracistoj en la tuta lando (Usono), kiuj kapablas fari la operacion. La operacio ne estas danĝera, sed subtilega.

Nuntempe donitan okulon oni povas konservi nur kelkajn tagojn. Oni esperas plilongigi tiun konservperiodon. Laŭ statistiko, estas nur en Usono, 300.000 da blinduloj, el kiuj 60.000 povus akiri vidpovon dank'al supre priskribita operacio.

X.

NOVAĴOJ el JAPANUJO
sendis L. Rodo

Novajoj ekkomencas alveni el Japanujo. Ni ricevis poŝtkarton de s-ro Sadaziro Kubo, ĵurnalisto kaj art. kritikisto, kiu vizitis Parizon en 1939. Lia domo en Tokio estante detruita dum la milito, ĵi loĝas nun, kun sia familio, en malgranda urbo 50 mejloj norde de Tokio. Li sendis sian bonmemoran saluton al s-roj Dronchat, Archdeacon, Couteaux, Raymond Schwarz kaj fino Yvonne Paulier.

Letero el Hungarujo

Tre Est. Samideanoj :

Ni legis vian artikolon pri maroka Esperanto-movado kaj samtempe perpkarto ni skribis al la radio-stacio en Rabat, petante la esperantlingvajn disaŭdigojn !

Ni treege ĝojus, se tamen ni povus aŭskulti kaj aŭdi la esperantlingvajn paroladojn kaj sciigojn ! Bonvolu demandi al viaj ge-anoj, kiuj volas korespondati kun ni kaj eble interŝ. P.M. il. FK. ktp.

Kun sineŝraj salutoj.

Dr. Lukács Gyula
financdirekcio
SZEGED, (Hungarujo)

Kiu respondos ?

(daŭrigo de 24 paĝo) ENKETO.

Respondojn sendu amase je nia adreso : AFRIKA REVUO, 5, rue Savorgnan de Brazza, Casablanca, Maroko.

La duan rezultaton de tiu enketo ni publikigos en aprila numero.

Knif.

PAROLAS LA LEGANTO

...ricevinte la unuan numeron de AFRIKA REVUO, mi rapidas danki kaj gratuli vin por tiu bela eldonajo... Vin kore salutas, L. THEVENIN, Francujo.

KVIN MONATOJ ĈE PIGMEOJ

LA DUDEKDUJARA GVIDANTO DE EKSPEDICIO, DUM RESTADO EN CASABLANCA, REVENINTE EL OUBANGHI-CHARI, RAKONTIS AL NI SIAN INTERESAN TRAVIVAĴON

Grupo de dudeko da junaj esploristoj forflugis en aŭgusto el Francujo en du militistaj aviadiloj je esplora aventuro. Post alveno al Congo, kie ili dividiĝis je du grupoj-unu grupo eniris la ekvatoran praarbarregionon, kie de post kvin monatoj ili vivis malproksimege de la civilizita mondo.

Dum ilia restado ĉe pigmeoj (La plej granda pigmeo atingas unu metron kaj tridek centimetroj da alteco) la junaj esploristoj, observis la vivon de tiuj malgrandaj negroj, dikventraj, tinemaj, fetiĉaj, pli ol duone sovaĝaj, de inter kiuj, la plej granda parto, neniam antaŭe vidis « blankulon ».

Milo da gramofondiskoj estis registritaj kaj pluaj filmoj « turnitaj » inter kiuj, unu estis farita dum unu kaj duono da monato. Ĝi estis farita ĉe Babingaoj ; la filmo reprezentas la ekzaktan bildon de pigmea vivo : bubalaj antilopĉasado, fiŝkaptado, edziĝfestoj, mango-kuirado, diversaj festoj, danc-scenoj ktp.

La ekspedicio kolektis diversajn fetiĉojn kaj diversajn dokumentojn, kiuj estos donacitaj al homo-muzeo en Parizo.

La dua grupo, kiu konsistis el unu geologo, unu arĥeologo kaj unu prahistoriisto krom aliaj, eniris la valon de Niari kaj esporadis la praabaron de Gabon. La grupo malkovris tre gravan prahistorian medion apud la vilaĝo Moussia en Meza Kongo, en groto, kies enirejo estis kovrita per dianoj de la virga arbaro.

La esploristoj eniris groton tra larĝa pordego, kie ili malkovris prahistorian hom-laborejon. En kelkaj lokoj, la arkajoj estis tridekmetrojn altaj kaj la galerioj etendiĝas je du kilometra distanco, ĉe ambaŭ flankoj de la valo.

Kontraŭ unu el rokaj kolonoj, oni malkovris postsignojn de polurado, gravurado kaj tre grandan kvanton da diversaj ŝtonaj instrumentoj.

VAMPIRA GROTO

Esplorante la groton apud Diboueta, en kiun oni eniras per apenaŭ hom-alta pordo, la esploristoj eniĝis koton el kiu eliĝadis venena gaso, igante la aeron ne etenebla.

Tiu groto estis plenigita per grandaj hiropteroj, apartenantaj al la familio de vampiroj, kiuj ĝis nun estis troveblaj nur en centra Ameriko.

En malprosperaj jaroj, indiĝenoj, ĉasas tie la vampirojn, sed ĝenerale, kvar el ĉasistoj neniam revenas el tiu ekspedicio, laŭ *onidiro*.

Kiam mi demandis al la ekspedici-ĉefo, kia estis lia vivmaniero en ekvatora arbaro, li respondis :

« Ni vivis ekzakte kiel la indiĝenoj mem, ĉar ni ne povis kunporti multe da pakajoj. Ni dormis en indiĝenaj kaŝejoj (ne forgesinte kunporti D. D. T.). Ni manĝis kiel ili la nekuiritajn radikojn krome, kunportitan rizon, densigitan enskatoligitan lakton kaj konfituron.

Neniam ni trinkis vinon aŭ alkoholaĵon, malgraŭ ke la akvo estis oftege maltrinkebla. Ni manĝis bubal-kaj antilopviandon, kiujn ni intersanĝis kontraŭ pu'voro ».

— « Cu vi havis multe da malfacilaĵoj alispecaj dum via restado en virga praarbaro ? ».

— « La varmego, malsekeco, moskitoj kaj en oktobro teruraj uraganoj, persekutadis la virgan arbaregon, igante ĝin preskaŭ ne trairebla. Ni estis ankaŭ pikvunditaj per kreskaĵoj, aŭ animaloj, kiuj kaŭzis al ni vundoj, neresanigeblaj. Fine la unua parto de nia ekspedicio, havis malfacilaĵojn pro renversigitaj barkoj kaj du malfortaj pontoj, kiuj ruinigis sub la pezo de niaj ŝarĝveturiloj.

« Krom tio... ĉio estis en ordo ».

Irène FINK.

REMEMORO

Ankoraŭ foje, mi per paŝoj pezaj
Reiras al la monto de rubaĵo.
Salutás min-restoj jen enmezaj,
Ruinoj de iama posedaĵo.

Ci-tie ludis iam la infanoj.
En ĉiu ĉambro sonis ĝoj' sufiĉa.
Jen sidis mi, la plumon en la manoj,
Jen estis mi ja reĝo rev-feliĉa.

Ho, kiom amis mi la aĵojn ĉiujn
La kunligitajn firme al la koro !
Neniam ricevos mi karaĵojn tiujn.
Al mi ja restis... nura rememoro.

Silentas nun la rondo ruinara.
Nur malproksime sonas urba bruo.
Jen iam estis mia hejmo kara,
Kaj en la domo estis ĝoj' kaj ĝuo.

La karaj arboj portas foliaĵon,
En la ĝardeno floras iu floro.
Rigardos mi iaman posedaĵon,
Al mi ja restis... nura rememoro.

F. HAHN Bremen.

RIDU !

JUGISTO : Tiu, kiu interrompos la
jugadon, estos tuj forigata el tiu
ĉambrego.

JUGATO, (kriante) : bravo ! Prave !

Efektivigu tiun ordonon. oni forigu
min. tuj !

EN TOMBEJO. — Joĉjo legis surskri-
bojn troviĝantaj sur la tombo-ŝtonoj,
kaj post esti leginta multajn, li de-
mandas : Paĉjo, kie oni entombigas
a! malbonajn homojn ?

EN LA TEATRO. Oni prezentas dra-
maĉon, konsistanta nur el konfliktoj,
malkontento kaj fatalaĵo.

Unua aktoro : Li : Dio mia ! Krue-
la estas mia sorto ! Neniam mi tiom
sufervis.

Si : Ho ! Cielo ! Tre malfeliĉa mi
estas ! La mofton mi preferas !

Li : Ve ! La morto ! Kiaj tiu puno,
kiam mi estas senkulpa ! ? !

Aŭdigas voĉo de iu teatra amato-
ro :) Kaj ni, Sankta Dio ! Kion ni fa-
ris, por suferi !

RECENZO

Stellan Engholm. « La Vivo vo-
kas » kvara libro de Ste'lo-Klubó. El-
donis Eldona Societo-Esperanto, Stoc-
kholm.

La aŭtoro estas unu el niaj origina-
laj verkistoj. Liaj romanoj, vekis an-
taŭ jaroj grandan intereson tiel pro

la bona stilo kaj la temo de la libroj.

La aŭtoro ĉerpas temon el la laborista vivo, pri kiu li rakontas kun mildeco, malkovrante ties zorgojn, revojn, kaj amon.

La libro estas presita sur bonega papero, kiel cetere ĉiuj libroj de tiu konata eldonejo.

Ni trovis preskaŭ neniujn preserojn.

Resume, ni povos nur rekomendi tiun verkon al niaj legantoj.

IRFI.

PENSOJ

Amikeco signifas komunecon, oni rilatas samtiel al amiko, kiel al sia propra memo.

ARISTOTELES.

La scio fieras, ĉar ĝi tiom multe lernis, la saĝo estas humila, ĉar ĝi ne scias pli multe.

La vivo similas al tago. La tuta tago konsistas el tago hela kaj nokto malhela. La tuta vivo konsistas el vivo antaŭmorta kaj postmorta. Simile kiel hela tago sekvas malhelan nokton, same vivo antaŭmorta sekvas vivon postmortan.

F. Svačina.

SE nia AFRIKA REVUO PLACAS AL VI, REKOMENDU ĜIN AL VIA AMIKO, SE ĝi ne PLACAS AL VI, DIRU TION AL NI.

Cu vi legis jam la konatan romanon

« LUNO DE IZRAEL »

se ne, mendu ĝin, ĉe nia libroservo.

Ni plenumas la ekspedadon de libroj, tagon de alveno, de la mendo.

MAROKA ETNOGRAFIO

Krom araboj kaj berberoj la veraj indigenoj en Maroko pri kiuj mi jam skribis en miaj antaŭaj artikoloj en jaroj 1945 kaj 1946, loĝas ankaŭ tie hebreoj.

Estas du rasoj de judoj, de tre diversa origino: unue posteuloj de Plichtim, palestinaj judoj, kiuj venis dum la unua ekzodo en romana epoko, kaj posteuloj de Berberoj, kiuj ŝanĝis religion en judan. La lastaj loĝas speciale interne de la lando kaj apartenas al treege malnovaj socioj. Aliflanke andaluzaj judoj portugaliaj, provencaj kaj italiaj, kiuj enmigris de post Mezaĝo, kaj kiuj loĝas speciale en urboj interne de la lando kaj en havenurboj.

Gravaj servoj faris judoj marokanaj al loka komerco. Dank' al ilia inteligenteco kaj vere inda kapableco de asimilado, ili vigle profitas de instruado dank' al la metodoj de ĉie starigitaj lernejoj de « Universala Izraelida Alianco ». **URBOJ.** Oni povus partigi la urbojn en Maroko je urboj HADIRIYAS kaj urboj BEDOUIYAS.

La urboj HADIRIYAS (t. e. urbanoj) estas tiuj, kie loĝas la loĝantaro, nomita maŭroj, kiuj konsistigas la veran burĝaron sen kampara origino. La urboj Bedouiyas kiel la nomo indikas, estas loĝataj de loĝantaro beduindevena.

Estas en Maroko kvar urboj HADIRIYAS: Tetouan, Rabat, Salé kaj Fez. La burĝaro de Tetouan, kaj siaj laboristaj korporacioj, konsistas el posteuloj de Andaluzoj forpelitaj el Hispanujo kaj de Algerianoj, kiuj forasis ilian landon en 1830 jaro, forkurante de sub la franca (dominacio) regado.

Rabat kaj Salé estas ankaŭ loĝataj de Andaluŝoj, kiuj venis kaj intermiksigis kun la loĝantaro de du urboj, kreitaj probable de BENI IFREN, berberoj de la raso ZENETE, kiuj siatempe kreis sendependan regnon en SALE.

Andaluza elemento, venkis kaj kreis republikon, kiu havis sufiĉe konatan rolon en 17 jarcento. Estas ja utile rememori gravecon de rabataj kaj saleaj piratoj kiuj subtenadis la komercon de ambaŭ urboj per komercaĵoj kaj kaptitoj. Kapitanoj de remŝipoj la famekonataj RAIS, kaj ilia ŝipanaro estis rene-

gatoj, apartenantaj al ĉiuj naciecoj, kaj kiuj navigis je konto de Andaluzanoj. Depost la kondamno de pirateco, ili okupiĝas nur pri komerco. Ili konservis rafinitaj moroj, grandan kurtuazion, kaj malgraŭ la eksterajo, fanatikon muzulmanan, al kiu aliĝis vera sento de patriotismo.



La muzulmana loĝantaro de Fez, prezentas tute alian karakteron kaj oni povas diri, ke ĝi ne similas al loĝantaro en aliaj urboj.

En Fez estas ankaŭ Andaluzanoj kaj Alĝerianoj, posteuloj de refugintoj de antaŭ pli ol unu jarcento, sed tio kio vere konsistigas la burĝaron de la urbo — burĝaron samtempe aristokratan kaj komercantan — estos tio, kio oni nomas AHL FEZ. (La homoj el Fez). Tiu parto de la loĝantaro, kiu monopolas la komercon speciale de la urbo, tio estas la merkato la plej gravan en Maroko, konsistas — oni certigas — el judoj kiu mahometaniĝis.

Antaŭ ol regis en la lando Merenidoj, judoj ne estis grupigataj en « mellah » (juda kvartalo) ; ili loĝis en urbo kaj, speciale en la kvartalo, kiu etendiĝas inter la moskeo Qaraiyn kaj BAB el GUIZA.

Tie la riĉaj judaj negocistoj konstruis belegajn domojn, kie ili large vivis.

Je la fino de XVIIIa jarcento, meredina sultano Yacoub Ben Adb El Haqq, kiu finkonstruis FEZ EL DJEDID, (Fez-nova urboparto), profitis el la okazo, ke oni masakris kelkajn judojn, dum ribelete por decidi konstrui MELLAH, kaj volis devigi ilin interŝanĝi iliajn belegajn domojn kontraŭ novaj domoj, sed multe pli modestaj, kiujn ili konstruigis en la nova juda kvartalo. La malriĉaj judoj transloĝiĝis al Mellah, la riĉaj preferis mahometaniĝi kaj konservi iliajn palacojn. Jen kiamaniere, ĉiuj ĉefaj negocistoj en Fez islamigis kaj formas « AHL FEZ ». Ankoraŭ hodiaŭ Fez prezentas tiun specialecon, ke ne estas judaj komercistoj kiuj estas plej riĉaj, sed « AHL FEZ ». Se oni rememoras ke, antaŭ la araba invado, la loĝantaro de havenoj estis forpelita al interno de la lando kaj intermiksiĝis kun Berberoj judaj kaj kristanaj, oni povas sin demandi, ĉu tiu juda loĝantaro kiu islamkonvertiĝis por konservi siajn palacojn, ne estis formita el posteuloj de kartaginanoj, kies prauloj forasis idolanecon por judiĝi.

La AHL FEZ, samtempe kun alveno franca, elspezantoj, magnatoj k. negocistoj sciante bone fari aferojn, vojaĝante ofte, havante agentojn kaj filiojn en ĉiuj marokaj urboj, en Alĝerio, Tunisiio, Egiptujo, Senegalo kaj havante eĉ reprezentantojn en Parizo, Liverpolo, Londono kaj Manĝestero, uzante modernan librotendon utiligante la servojn de bankoj, estas kompreneble superecaj al aliaj loĝantoj de Maroko.

Oni renkontas judojn islamigitajn, kiu similas al tiuj el Fez kaj kiuj devenas el Taza kaj ECH CHAOUEN, tio estas el regionoj tute berberaj,

NEGROJ

La loĝantaro negra en Maroko, kiu estas sufiĉe granda, ne formas komunumojn. Ĝi estas dissemita sub formo de sklavoĵoj aŭ ekssklavoĵoj en urboj kaj tribuoj. Sklaveco komenciĝis, en Maroko en la antikveco kaj la komerco de negroj praktikigis depost longaj jarcentoj.

Depost starigo de Islamo, oni povas konstati la unuajn alvenadojn de nigruloj depost ALMORAVIDOJ, kiuj antaŭ ol batali en Maroko, batalis kun negroj en Sudano kaj certe kunportis la sklavojn.

En XVa jarcento, sultano Ahmed El Manzour-sadien, sendis ekspedicion kontraŭ Ishaq Sokiĝ, sultano de Sudano kaj devigis lin pagi tre grandan tributon en sklavoj kaj ora sablo. Ahmed El Manzour, volis, per tiuj sklavoj, krei nigran gvardion ; li ne havis sufiĉe da tempo kaj la negroj disetendiĝis en la lando. Poste Mulaj Ismail ŝercigis tiujn negrojn kaj kreis GUICH DES ABID li konstituis tiun gvardion kaj nomigis ĝin gvardio de SIDI EL BOUKHARI, el kio devenas la nomo « BOUKAR », kiun la nigra gvardio konservis ĝis nun.

Pie, tre grava sklava komerco ekzistis, antaŭ ol francoj alvenis Marokon,

depost Tumbuktu ĝis Marakeŝ tra Sus, kaj depost Bornu tra Fez, tra Filaleŝ et Tuat.

Pro ĉiam kaj ĉiam pli granda malfacilaĵo, kaj poste pro tuta maleblo venigi negrojn, oni kreis en Maroko, specon de negro-bredego por ilin plinombriĝi. La gravaj personaĵoj urbaj kaj vilaĝaj, vendis la « produktaĵon » de iliaj sklavoj.

Oni diris de tempo al tempo, ke maroka sklavoj, ne estis malfeliĉa ; tio dependis multe de lia posedanto. La sklavoj estis eĉ protektita per legaro relative homeca, kiu principe devigas sian posedanton vendi lin, se li sentas sin tro malfeliĉa ĉe li ; estas tamen la vero, ke multe da sklavoj forkuris profintinte de alveno de Francoj al Maroko. Hodiaŭ sufiĉas, ke sklavoj turnu sin al francaj aŭtoritatoj por liberigigi.



Oni devas aparte trakti HARATINOJ, tre bruna raso, preskaŭ nigra, kiu estas tre ofte renkontata en Maroko, sed kiu troviĝas speciale en la regionoj DRAA, TAFILALET kaj Sus. Oni ne ankoraŭ scias ekzakte la devenon de tiu raso.

HARATINOJ estas utiligataj por tre penigaj laboroj kaj speciale en fajra arto, metalurgio kaj la ceramiko.

NI DISTRU NIN !

Enigmokonkurso.

En la 1-a N^o de A. R. ni organizis enigmokonkurson. La konkurson povas partopreni ĉiu leganto, kiu atingos minimume 10 poentoj kaj sendos kuponon.

Premiojn ni fiksas tri : 1) La Vidvineto ; 2) Pensoj de Zamenhof ; 3) Johano kaj Silvio.

ENIGMO N^o 2

Kalkulografo. sendis S. Gonzalez

- | | |
|---------------------------------|--------------------------------|
| 1) 9, 7, 4, 7, 11, 4 | 7) 5, 9, 14, 4, 8, 2, 12, 8, 4 |
| 2) 18, 2, 7, 17 | 8) 6, 5, 10, 2, 8, 4 |
| 3) 5, 2, 7, 15, 4 | 9) 19, 2, 19, 4 |
| 4) 2, 17, 9, 5, 4 | 10) 16, 5, 9, 15, 16, 9, 20 |
| 5) 17, 16, 3, 5, 2, 21, 4 | 11) 4, 5, 2, 6, 7, 8, 4 |
| 6) 9, 5, 15, 16, 10, 6, 7, 8, 4 | |

KLARIGILO : 1) Aperas en ĵurnaloj. 2) Nomo de konata esperantistino. 3) Oni metas sur fingron. 4) Unua aviadisto. 5) uzas kudristinoj. 6) Pruvo. 7) Metiisto. 8) Loĝas malproksimege de homoj. 9) Kontrŭo de l'morto. 10) lando. 11) Mondflanko.

La tuto donos duoblan nomon, jam tre konatan kaj ŝatatan.

Por solvo de tiu, « Kalkulografo », ni kalkulas 3 poentoj. (Por la solvo de la unua Enigmo aperinta en la 1-a N^o de A.R. ni kalkulas 2 poentoj. La Klarigo ne aperis pro eraro de la presisto).

ENIGMO N^o 3

E. I. Onerniĝ.	P. S. Retirotolet	A. Rotou
----------------	-------------------	----------

Kiun metion posedas tiuj personoj ?

Por tiu enigmo ni donos 3 poentoj.

La solvojn bv. sendi plejmalfrue ĝis 31 majo 1947. (poŝta stampo).

En la aprila numero, ni donos la solvon de 1-a enigmo, kaj staton de la Konkurso.

KURONO N^o 2 por
II-a ENIGMOKONKURSO

PAG-TABELO

LANDO :

transsendu la monon al :

ARGENTINO	Giordano Bruno Lopez, Amalia 347, Buenos-Aires.
AUSTRALIO	L.E. Pfahl 64. Brighton Street Croydon N.S.W.
AUSTRUJO	« Tramondo » WIEN 1, Neutorgasse 9 A.E.F.
BELGUJO	G. Van den Bosche Oostenstr. 26 Antwerpen.
BRAZILO	Brazila Ligo Esperantista, Praca de Republica 54, Rio de Janeiro.
BRITUJO	Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth (Herts).
BULGARUJO	Internaciaj poŝtaj respondkuponoj, rekte al ni.
CEHOSLOVAKUJO	Jaroslav Sustr, Benediktská 11, Praha I.
DANUJO	Dansk Esperanto-För'ag, Ingemannsvej 9, AABYHØJ (Giro : 16295).
EGIPTUJO	INTERNACIA ESPERANTO — Ligo.
FINNLANDO	Joe Vilkki, Somero PGk. 60253.
FRANCUJO	Je nia poŝtëkkonto (Fink) 111. 75 Rabat aŭ per simpla poŝtmandato, je la adreso de nia redaktorino.
HISPANUJO	R. Gonzalez, C. Gutenberg, 8 pra. Madrid.
IRLANDO	L. O'hUiginn, Sonas, Cnoc na hInneona, Dundroma — DUBLIN.
ISLANDO	Internaciaj poŝtaj respondkuponoj, rekte je nia adreso.
ITALUJO	L. Minnaia, Viale Giulio Cesare, 223, Roma.
KANALO	Monon en leteroj je nia adreso aŭ inter respondkuponoj.
MAROKO	Nia poŝtëkkonto (Fink), 111, 75 Rabat.
NEDERLANDO	P. Moen, Schaarsbergenstraat 104, DEN HAAG poŝtëkkonto 4463.
NORVEGUJO	Norsk Esperanto — Forlaget A.S. Boks 942, OSLO, Postgiro 100 31.
NOV-ZELANDO	V. J. Leck P.O. Box 330, Wellington C. I.
PALESTINO	Internaciaj poŝtaj respondkuponoj aŭ al I/E. L. Anglujo.
POLUJO	Roman Sakowicz, Asnyka, 4 Warszawa — Okiecie.
PORTUGALUJO	Portugala Eldona Rondo, de Freitas, Monte da Lapa; 49-1, Porto.
RUMANUJO	Rumana Esp. Societo, Bukareŝti, Casuta Postala 9.
SVEDUJO	Forlagsforeningen Esperanto u.p.a. Stockholm 19 ; 19071 (poŝtëkkonto 578).
SVISLANDO	O. Walder : Eigenheim, Romanshorn Pëk. VIII 12139.
TURKUJO	Internacia Esperanto — Ligo, Heronsgate, Rickmansworth (Herts) Anglujo.
URUGVAJO	P. Casas, Mercedes 927 Montevideo.
USONO	Mono en letero al nia adreso aŭ Donald E. Parrish, 328 West 46 th Street, California.

GRAVA NOTO :- Ciu povas rekte sendi al nia redakcio 15 internaciaj poŝtaj respondkuponoj, en simpla aŭ rekomendita letero.

LA BRULIGANTO BRULIGATA

En 1476 la urbo Bolsvard parte forbruliĝis. En tiu epoko la domoj estis konstruataj per ligno. Iam urbano Ulbeo Lejdekerio ekbruligis la domon de sia malamiko. La ventego disvatigis.

La suspekto falis sur Ulbeo Lejdekerio ĉar tiu ĉi urbano malaperis el la urbo, pro ne konataj motivoj. La Bolsvarda ŝipestro, kiu ĉiun semajnon velvojaĝis Amsterdamon, ekvidis en tiu ĉi urbo la malaperinton.

La viron li allogis per ruza parolo en la ŝipon kaj ligis per ŝnuroj.

Tuj kiam la velŝipo atingis Bolsvardon, la suspektulo estis liverita al la juĝistaro, kiu kondamnis Ulbecon je morto per fajro.

Komunikis : J. BACHOFNER.

BV. KOREKTI JENAJN PRESERAROJN, kiujn, ni rimarkis en 1-a n^o de A.R. paĝo 2, lasta linio devas esti diligenta.

paĝo « 59 linio, 2 kolono : atingo. 6 artikolo « LA MAROKA VIRINO ».

7 linio devas esti ŝtofvolvajo. paĝo 15, 5 linio devas esti : punĉo paĝo 16, artikolo « MOVADO FRANCA de ABUNDO », 15 linio, kalkulante de malsupre, devas esti misordo. Krome la presisto (certe en la lasta momento) intersanĝis la du kolonojn de III-paĝo de la kovrilo Konsekvence la adreso de F-ino Z. Ciperova, ne estas tute orde presita.

Kio koncernas nian manieron anstataŭi la supersignitajn literojn ĝi estis diversmaniere akceptita de nia samideanaro. Duono da voĉoj aprobas ĝin, alia duono malaprobas. Sed tiu numero, certe kontentigos ĉiujn.

MAROKA DOMO

Mi volas vin enkonduki en la maŭran domon.

Generale la marokanaj domoj ne estas altaj — ter — aŭ unu — etaĝaj, kun plataj tegmentoj (terasoj) kaj de masiva konstruo. Ekstere ili prezentas monotonan aspekton, kaŭze de preskaŭ tuta manko de fenestroj. Granda pordo, kovrita per najloj, estas la sola malfermaĵo. Bronza frapilo entataŭas la sonorilon.

Sekvu min, sed ne teruriĝu pro mallumo, kiu regas en la vestiblo post fermo de la pordo. Baldaŭ duonombro ĝin anstataŭos, kaj vi eksentos agrablan malvarmeton kiun produktas la dikaj muroj. Kaj vi trovos, ke la muroj, ĝis nun ŝajne nigraj, estas kovritaj per artaj skulptaĵoj kaj arabeskoj el fajenco — kaj ho ! la miraklo... en la fono de vestiblo — ĉarma vidaĵo : la korto araba. Ĝi malsimilas al ĉiuj kortoj de vi konataj. La araba korto situas meze de la konstruaĵo kaj samtempe anstataŭas ĝardenon de la domo, ĉar en ĝi kreskas oranĝarboj, citronarboj, kaj aliaj ekzotikaj vegetaĵoj. Meze de la korto troviĝas fontano, ĉirkaŭata de vazoj kun belodoraj plantoj. La korto havas marmoran plankon (kie ne kreskas plantaĵoj) kaj estas ĉirkaŭata de arkadoj sur kolonoj. Sub la arkadoj vi trovos multajn pordojn, kiuj kondukas al la logejoj — aŭ pli ĝuste loĝejoj — de virinoj (ĉar islamanoj laŭ sia riĉeco posedas unu aŭ pli da edzinoj), sed kompreneble, kiel fremdulo, vi ne povas eniri tiujn ĉambrojn, ĉar ili estas ĵaluze fermitaj. Tamen, kontraŭe, la enloĝantinoj observas vin scivoleme de malantaŭ la kurtenoj, kaj ĉiu via gesto estos poste en amikina rondo larĝe komentita.

Je la unua etaĝo, kiun vi atingos pere de marmora ŝtuparo, troviĝas gastĉambroj kaj salono, kie oni gastigos vin kun vere orienta gastameco. La mastro de la domo regalos vin per bongustaj kukoj kaj teo kun mento, kiujn bongustaĵojn alportas silentemaj geservistoj.

Tapiŝoj, teksitaj de la enlandaj teksistinoj, kovras fajencan plankon.

La plej famaj tapiŝoj estas tiuj de Rabat kaj la Berbera Montaro. En la riĉaj domoj oni trovas ankaŭ persdevenajn aŭ alĝeriajn tapiŝojn. La meblaro konsistas plejparte el kusenoj arte broditaj, kiuj troviĝas laŭlonge de la muroj, kaj malxaltaj tabloj, ne pli altaj ol 30-40 cm. super la planko. Ĉie oni rimarkas vazojn kaj ceramikaĵojn: la plej fame konataj, manfaritaj, estas tiuj de Safi, kie la ceramika industrio estas tre disvastigita.

Oni admiras silkajn tablotukojn mane broditajn, kaj punktojn, ĉio manfarita de hejmaj virinoj. Sur la muroj pendas armiloj: paŝiloj, pistoloj, kurbaj ponardoj, kaj pulvujoj. Al la cedra plafono estas fiksitaj belegaj lustroj, bronzaĵoj aŭ kristalaj.

Unuvorte, vi povas rimarki, ke la maŭra domo estas adaptita al la klimato de la lando, kie la pluvo estas malofta (kelkajn semajnojn en la jaro) kaj la suno tre varma dum preskaŭ la tuta jaro. Kompreneble la supre priskribita domo apartenas al la riĉa parto de marokanoj: la malriĉuloj devas ofte sin kontentigi per unu ĉambro por la tuta familio, kiu atingas ofte la nombron de 5 ĝis 10 personoj. Tia stato estas en la urboj: la kamparanoj loĝas en tendoj, ĉar estante migranta popolo kaj dependante de la paŝto por sia brutaro, ili ofte devas ŝanĝi la loĝlokon.

Irène FINK

SUDARKTAJ KONTINENTOJ

Dum la ĵus finita mondmilito, homoj de kvar nacioj esploris kaj surkartiĝadis la sudarktan kontinenton; tiuj nacioj estas: Britujo Usono, Norvegujo kaj Argentino. Tiu regiono estas kredeble tiel mineralriĉa, kiel la moderna industria regiono kiun kreis Sovietunio en la nordarkta rondo.

La Brita registaro sendis duan esplorkompanion por studi la eblojn profituzi la mineralojn de sudarktejo. En Aprilo 1944 la preparkompanio sin starigis en Graham lando, kaj nun 40 scienculoj laboras en stacioj inter Sud Georgia lando kaj la Weddel maro.

Antaŭ nelonge la usona registaro decidis elspezi grandan monsumon por elara surkartigo de nova regiono en Reĝino Maud Lando. Norvegaj spertuloj studadas la komercan kaptadon de balenoj (t. e. mamnutrofiŝoj).

Certe estas en Sudarktejo grandega kvanto de karbo, kaj ankaŭ fero, oro, molybdeno kaj krupo. Iu spertulo asertas, ke estas karbejo je longo de 1600 km-oj. Eble estas ankaŭ petrolo kaj radiumo.

De Sudarktejo oni povas antaŭdiri

la veteron. Ties malvarma vintro kaŭzas en sekvantaj monatoj multan pluvon en suda Sud-Ameriko, en Sudafriko, en Nova Zelando kaj en suda Aŭstralio. Varma sudarkteja somero plenigas la maron, per fluiganta glaco kaj la malvarmiginta maro malgrandigas pluvon en la interna Sudafriko.

Ni nun kredas, ke sudarktejo estas plejparte granda feramaso; sed ni ne scias ĝian precizan formon; eble ĝi konsistas el du aŭ pli da insulaj amasoj.

Norvegujo pretendanancis je la lasta tiea nepretendita teritorio en Januaro 1939. En la sama monato la usona esploristo Ellsworth flugmaŝine alvenis en orienta sudarktejo kaj starigis la usonan flagon sur kio li kredis, estas la lasta nepretendita regiono. Fakte Mawson jam tie estis en 1931 kaj pretendanancis la regionon Brita. Nuntempe la kartoj dispartigas la 15 milionojn de kvadratkilometroj, inter sep registaroj, sed pri la limoj estas malkonsentoj. La landoj estas: Usono, Britujo, Norvegujo, Francujo, Nova Zelando kaj Argentino.

Mawson mencias inter eblaj nemi-neralaj industrioj, peltobestoj kaj fiŝkaptadon; Elektran forton, donus la

ventegoj, kiuj plejofte havas rapidon de 80 k.p.h. kaj kelkfoje 550 k.p.h. ; la sovietaĵanoj jam sukcesis uzi la ventegan forton en Siberio.

KLASIKA TRAGEDIO

Antaŭ mi kusas sur mia skribtablo, libreto malpretenda : ROMEO kaj JULIETO, tragedio de William Shakespeare. Sinjoro Stephen A. Andrew tradukis ĝin en nian mondlingvon. Jam dufoje mi legis la libreton kaj post iom da tempo denove mi legos ĝin. Mi ĝojas pri la posedo kaj kromtio pri la kapableco legi Esperanton.

Ekzistas, esperantistoj, kiuj intencas korespondi. Certe, ekkoni alilandanoj estas ĝojo. Aliaj vojaĝos kaj vizitos fremdajn landojn kaj per Esperanto ili komprenigos sin. Tiu, kiu intencas esplori la eblecon esprimi pensojn Esperante, legu tiun tragedion kaj relegu ĝin. Ĉiufoje li trovos novajn belecojn ; la paĝoj estas same kiel kampoj sur kiuj floras ĉiam novaj floroj.

H. J. Bachofner.

LA CISTERNO

de L. Thévenin

Siajn kruĉojn el argilo,
Sur la kapon metis ili,
La virinoj de l'Islamo.

Al cisterno ili iris,
Babilante sur la vojo.
El cisterno ili ĉerpis,
Post levigo de l'vualo,
Freŝan akvon, kaj remetis
Siajn kruĉojn sur la kapon.

Sur la vojo, kun babilo,
Al la hejm' revenis ili,
La virinoj de l'Islamo.

LETERKESTO

S-ro Carther, 82, Malika Farida; Ni bone ricevis vian sendaĵon. Vi certe estas jam en posedo de la n° A.R. Ni volonte akceptus vian kunlaboron. Sendu regule sciigojn pri E. movado en via lando. Kore salutas la Red.

S-ro P.F. LYON. (4°) Dankon por via letero. Via anonceto aperas en tiu ĉi numero. Ni klopodos kontentigi vin. Bedaŭrinde en Tunisio estas neniu movado. Ankaŭ en Algerio estas preskaŭ samo. En Sudafriko laŭ nia scio ekzistas unu grupo malvigla. Se ni ekscios ion interesan, certe vi legos tion en A.R. Intertempe, eble la artikolo pri Pigmeoj, konsolos vin. Fortan manpremon.

LETERO el ASTRUJO

Karaj Gesamideanoj !

En Aŭstrujo en 1946 fondiĝis « Aŭstria Societo de Amikoj al E. » kiu celas atentigi la vastajn publikajn rondojn al niaj lingvo kaj movado kaj ĉefe al la enkonduko de E. en la lernejojn.

Goje ni povas al vi raportiti, ke jam pli ol 3000 personoj aliĝis al la societo, inter ili gravaj personoj el la politika, scienca kaj kulturaj medioj. Nia federacia (ŝtata) kancelerio, ing. Leo. Figl estas nia honor-prez. ; en la honora komitato estas pli ol 30 eminentaj aŭstriaĵaj personoj.

La societo eldonas kvaron-jaran revuon naci-lingvan kun varba-kaj propaganda enhavo kaj estas sendata ne nur al anoj, sed ankaŭ al ĉiuj gravaj aŭtoritatoj, lernejoj..

La nova societa estraro konsistas el s-anoj sekcia konsilisto de la instru-ministerio D-ro Maximilian Führung, prezidanto, financ-oficisto Ferdinand Noggler el Silzbur kaj kaik. revid. Rajmund Cech, vic-prezidantoj ; urba oficisto Adolf Peterlik, sekretario kaj pluaj 20 ge-anoj el ĉiuj liglandoj.

Ni petas vin akcepti niajn samideajn bondezirojn por prospera agado en via lando por 1947 kaj la esprimojn de niaj semcelanaj salutoj.

AUSTRIA SOCIETO DE AMIKOJ AL Esp.

S-ro Balkanyi, ĉef delegito de IEL por HUNGARUJO, petas nin publikigi jenajn sciigojn :

— Skribu multaj al hungara Radio, Budapest VIII Brôdy Sándor u. 7, petante E.-disaŭdigon !

— Petu multaj Esp. prospekton de Turisma Oficejo (kiu aliĝis al IEL) : BUDAPEST V. Deack Ferenc u. 2.

— Petu multajn informojn de mirefikaj sanigfontoj Banejdirekcio, HAJDUSZOBOZLO, HUNGARUJO. (Aligis al IEL).

— Se iu deziras hungarajn komercinterrilatojn, petu adresojn de firmaoj, fabrikoj de Komerca Cambro, Budapest V. Szerere, u. 6. kaj Hungara Generala Kredit-banco, BUDAPEST 507. (Aligis al IEL).

— Privatoficista sindikato deziras organizi Esp. por korespondi inter oficistoj. Oni skribu al sindikato, BUDAPEST VI, Eötvös-u. 25. a.

— Saman proponu al sindikato en via lando.

— Oni nun permesis la nedevigan instruadon en ĉiuj hangaraj komerciernejoj. Sukceson al via movado.

Kore salutas Paulo Balkányi.

INVITO AL SVEDA JUNULARKUNVENO !

Dum la tempo 12-15 de julio 1947 (tuj post la internacia somerkurso en Skövde) okazos junularkunveno esperantista en JURSLA apud la urbo NORSKEPING en la mirinde bela regiono de Kolmården. Bonegaj bankaj sportebleco !

La partoprenantoj loĝos en bonega « esperantista somerhejmo » kaj oni aranĝos malmultekostan manĝaĵon. Bona tendkampo troviĝas por tendemuloj.

La programo ankoraŭ ne estas tute preta, sed ni promesas, ke ĝi estos enhavoriĉa kaj povos doni al la partoprenantoj abunde da « korpa kaj spirita nutraĵo ».

Do, ni invitas eksterlandajn gejunulojn al nia kunveno kaj promesas helpi al ĉiu kiu deziras veni al nia lando ĉi-somere !

Bv ; peti informojn kaj aligilojn (menciinte, ke la sciigon vi legis en AFRIKA REVUO) ĉe : S-ro K.E. Andersson, Jursla SÅBY.

Kompreneble troviĝas multaj malfacilaĵoj rilate eksterlandajn vajaĝojn sed ni faros nian eblon helpi al vi.

Do, bonvenon al Svedlando — al la bela sveda somero 1947.

SVEDA ESPERANTO-FEDERACIO-
Junulara SEKCIO.

TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO-
SVEDA SEKCIO.

REDAKCIO RESPONDAS

S-ro. M. Mrot D-ry. Dankon por la letero. Ni sendis la gazeton al indikita adreso. Ĉu vi ricevis jam librojn ? Ni pristudas vian sugeston. Eble tio estos realigebla. Ni atendas la anoncitan artikolon. Vi certe estas jam en posedaĵo de I n°. Kore salutas Red.

S-ro A.J.B.-d. S-nes. Koran dankon por senditaj adresoj kaj artikoloj. Fartu bone kaj saluton, kareson por via filineto.

S-ro R.D.S. ras. En ĉiu okazo, kiam vere vi ne scias kiun prepozicion utiligi, kurage anstataŭ ĝin per prep. « je ».

F-ino A.F.W-a Volonte ni sendos al ; indikita adreso, nian revuon ; ni estas kontentaj, ke ankaŭ viaj amikoj ekabonos. Saluton.

S-ro K.R.P. Los A. - s. Dankon por viaj vortoj. Ni jam sendis al vi I-an n° n.

S-ino G.R.-e. A-m. Vi povas sendi se vi pensas, ke ĝi interesos ankaŭ alilandaj legantoj.

S-ro S.S-n. B-e. Sendu kuponon, estas necesa tiu atesto.

S-ro R.E.G.O.-o. Volonte ni akceptos tiun manieron de pago, sed vi povas pagi al indikita adreso, laŭ plaĉo. Saluton.

S-ro A.A-n.-j. Ni sciis, ke vi estas fidela, dankon por la helpo. Salutu vian amikon.

S-ro G.H-en. P.-e. Gi estis hektografita dum 1945-46, pro manka de ĉio. Nune dank'al tiaj amikoj, kia vi mem estas, ĝi disvolviĝos kaj floros. Reciprokan saluton.

A.N-es. L-e. Bedaŭrinde, via poemo ne taŭgas por nia, revuo ni preferas artikolojn. La anoncita foto, ne ankoraŭ atingis nin.

S-ro F.H-n.B-en. Dankon por bela poemo. Sendu ankaŭ aliajn kaj artikolojn interesaj, ankaŭ estos bonvenaj. Ni kore salutas vin (Ni sangis la nomon de nia revuo ; antaŭe L.V.F.).

« VIRINETO en BLUO kaj aliaj rakontoj »
de Mason Stutard, mendu ĉe nia
LIBRO-SERVO ;

LA NOMBRO CERTIGOS NIAN VIVON. ANTAŬEN, ĝis 1000.

MAROKA KRONIKO

CASABLANCA. Dum la G. K. de M. E.A., kiun ĉeestis tre malmulte da samideanoj, pro malfacilaĵoj en transporto, kaj ne ĝuste elektita dato, estis reprezentitaj, jenaj sekcioj Agadir de s-ro Mercy por 7 membroj. Casablanca, de sia komitato; marakeŝa, de f-ino Lea (40 membroj 8 voĉoj); meknesa de la sama samideanino (17 membroj 3 voĉoj). La debatoj estis tre haosaj. Ni ne ricevis ankoraŭ oficialan raporton en la momento, kiam ni redaktas tiun kronikon, kaj timas, ke ni ne povos vin ankoraŭ informi, pri la rezultato de G. K. en tiu ĉi numero. Pertelefone ni eksciis nur, ke jenaj personoj estis elektitaj por la C.K.:

prez. S-ro Pinty
ĝ-sekr. s-ro Tronchon
admin. sekr. : Leal
kasistino : s-ino Tronchon
bibliotekisto s-ro Chauveau.

En la sekcio oni gvidas Esp.-kurson por 12 junulargastejanoj.

En Roch-lernejo, oni malfermis senpagan kurson por 43 knabinetoj.

MARRAKECH. Kanthoroj gvidataj de profesia muzikisto, s-ro Amar (instruisto) regule okazas. La unua okazis la 8-an de dec. 1946. La kanthoro konsistas el 20 s-aninoj. Dua kanthoro okazis 5.I.k.j. La horo okazos ĉiun unuan dimanĉon ĉiu monate. Jam jenaj kantoj estas prilaboritaj: « LA ESPERO », « ĈE MIA KARULO », « LA BOHEMO » kaj « PASINTAJ TAGOJ ».

KURSOJ. La 18-an de Jan.k.j. sabate oni malfermis la 1-a gradan E.-kurson en liceo Mangin, kun 11 gelernantoj. Dimanĉon, la 19-an de Jan. je la 10 1/2 oni malfermis en la sekcio, la duagradan kurson kun 9 lernantoj. La unua-grada kurso okazos ĉiusebato, la dua-grada nur 2-foje en la monato.

Jen la monata programo

9-10 kanthoro

10-11 estrar-kunveno

1-a dimanĉo : 11-12 : duagrada-kurso de 9-12, funkcias la libro-prunto.

2-a dimanĉo 10-11 Biblioteko, Informejo.

3-a dimanĉo 10 1/2 2-agrada kurso kaj biblioteko.

4-a dimanĉo : kiel la dua.

La sekcio abonas sekvantajn gazetojn : E. I. Afrika Revuo, Heroldo. Fr. E-isto. E.-lernejo.

MEKNES. La kurson en liceo Poymirau gvidas prof. Apcher, jam okazis 15-a leciono, kun 15 lernantoj. S-ro Couvert, gvidas E.-kurson por militistaj aviadistoj kun 30 lernantoj. S-ino Couvert gvidas kurson dum « les activités dirigées », en la lernejo, kie ŝi estas instruistino. Siaj lernantoj korespondas kun anglaj infanoj. S-ro Apcher instruas perkoresponde en Oulmés. Sia lernantino, fervore laboras kaj baldaŭ aliĝos al M. E. A.

32-a Universala Kongreso de Esperanto 1947 en Bern.

REGISTARANO D-RO ENRICO CELIO

Honora Prezidanto de la 32-a Universala Kongreso de Esperanto

La Svisa Registaro rajtigas al sia Vic-prezidanto S-ro D-ro Enrico Celio, ministro de la Federacio Poŝt-kaj Fervoj-departemento estiĝi la Honora Prezidanto de la 32-a Universala Kongreso de Esperanto 1947 en Bern.

Per tio la Svisa Registaro montris al la Esperanta movado grandan honoron. Ĉar per tio ili esprimas sian ĝojon, ke la venonta Universala Kongreso okazos en Svislando kaj per tio ili ankaŭ aprobas la laŭdindan celon de la Esperanta movado kaj esprimas samtempe sian simpatian por la ideo de la mondlingvo.

La registaro transdonis sian plej koran deziron por la efektiviĝo de la Kongreso. Dum la Solena malfermo de la Kongreso. La 27-a de julio verŝajne la ministro D-ro Celio salutos la Kongreson en la nomo de la Svisa Registaro.

SENPAGA VIZO AL SVISLANDO

Ĉiu kongresano ricevos senpagan vizon al Svislando de la Svisaj Ambasadoroj aŭ Konsulejoj en eksterlando montrante la kongresan karton (nur por la kongresa tempo kaj postkongreso).

**MENDU BALDAŬ VIAN RESTEJON
EN BERN**

La LKK informas la kongresanojn de la 32-a Universala Kongreso de Esperanto, ke la restad-demando estas ege malfacila. Pro tio petas la LKK ke ĉiu kongresano tuj sendu sian mendon aŭ por hotelĉambro aŭ por ĉambro ĉe privatulo.

Pro la relative malgranda nombro de hotel- kaj privatĉambroj, kiuj estos je la dispono, estas LKK devigata pritrakti la mendojn laŭ la sinsekvo de ilia alveno al Bern kaj poste ne estos eble plenumi eventualan spe-

cial-deziron. La unuaj mendantoj ricevos la plej bonan servon.

Ankaŭ la mendanto de Amas-restejo devos baldaŭ sendi al LKK sian mendilon. Tiu kiu ne havas aliĝilon aŭ mendilon por restado ricevos tiun de la Loka Kongresa Komitato, Bundesgasse 20, Bern, Svislando.

TRANSPAGO AL SVISLANDO

La partoprenantoj de la 32-a Universala Kongreso de Esperanto 1947 en Bern loĝante en lando kun deviz-malfacilaĵoj devas turni sin tuj al la Landa Asocio, kiu faros la necesajn paŝojn por solvi tiun aferon.

LETERO EL SINGAPORO

Estimataj ge-anoj :

La kontraŭ-faŝisma milito ĉesis jam pli ol unu jaro, kaj en la tutmondo aŭdiĝas nun la popolvoĉo por demokratio, paco, kaj libereco.

Jes, ĉesis la milito, disfalis la faŝistoj Itala, Germana kaj Japana. Sed ĉu vere, ke paco kaj demokratio praktike regas sur la mondo? Kiel ĉiuj scias: Ne, tute ne! Nuntempe, ĉu en Eŭropo, aŭ en Azio la ĝemoj faŝistaj kaj reakciaj ankaŭ pli malpli reviviĝas.

Ni, esperantistoj, kie pac-batalantoj devas energie laboradi por la protekto de la mondpaco, kaj demokratio, por ke la homaro povu vivi en nia alt-idealismo « RONDO GRANDFAMILIA ».

En Singaporo, alidire en Malajo, aŭ la tuta Sud-Maraj insuloj la Esperanto-movado antaŭ la milito disvastiĝis iom post iom. En Malajo, Bangkok, kaj Batavio k.t.p. sin trovis organizacioj esperantaj. Sed dum la regado kaj buĉado de Japan-imperialismo, nia movado estis destruita. Multaj bravaj k-do mortis aŭ kaptitaj en la kontraŭ-Japana batalado. La perdo estas nekalkulebla.

Unu el ili estas k-do Hou Chio, la malnova, ĉiam laborema kaj entuziasma pacbatalinto, kiu estis fama en ĉina kultura cirklo. Kaj ni ankaŭ kredas, ke multe el la esperantistaro konis kaj iam korespondadi kun li.

Antaŭ kelktagoj ol la falo de Singaporo, k-do Hou Chio kune kun siaj amikoj rifuĝis al Sumatro, kie tuj li fariĝis la terkulturisto por viv-sinteno kaj por sekureco, ĉar li bone sciis ke kio okazos, kiam la Japan-imperialistoj lin trovis. Lia malfacila vivado en primitiva arbaro Sumatra pasis jar-post-jare, sed ve, fine li estis arestata de Japan-ĝendarmo en la 16-an de Marto 1944. Post la longdaŭra turmentado li mortis je la 23-a Majo 1944 en la karcero Sumatra.

Por la memorigo al k-do Hou Chio sub la gvidado de S-roj Cen Jek Su, Uan Su Jan, Hujuz k. t. p., la Hou Chio Publika Lernejo estas fondita lastjare. Unu el ĝiaj ĉefaj principoj estas por disvastiĝi la propagandon kaj edukadon de Esperanto, Latinigo de ĉina lingvo, kaj Indonezia lingvo.

Aŭgusto ĉijare, niaj gek-doĵ en Singaporo kunvenis en Hou Chio Publika Lernejo, kaj sukcesis organizi la Esperanto-Rondeton Singaporan.

La 2-an de Septembro, unua Esperanto-Kurso komenciĝis en la lernejo. Ĝia instruanto estas k-do Lu Bi. La kurso finos baldaŭ sukcese kun ĉirkaŭ dek kolegoj.

La 14-an de Decembro du specialaj eldonaĵoj (en Singaporo kaj K. Lumpuro) publikiĝis en ĉinlingvo, kompilitaj de Hou Chio Publika Lernejo kaj Esperan-

to-Rondeto Singapura je la memorigo por la naskiĝtago de Dro. L. L. Zamenhof.

La 15-an Dec. estas dimanĉo, matene okazis en Hou Chio Publika Lernejo la Memorkunveno por la Naskiĝtago de Dro. Zamenhof. La kunvenejo estis solene aranĝata. Portreto de nia majstro alte pendita kun verdaj steloj kaj standardoj, ĉe la muroj estis grandaj sloganoj « Per Esperanto por la Paco kaj Demokratio de la Mondo ! », « Unuiĝu sub la Verda Stelo ! », « Per Esperanto por Internacia Kompreno ! », « Lernu Esperanton ! » k. t. p. En la kunvenejo ankaŭ estis ekspoziataj multaj libroj, gazetoj, kiuj tre interesis la gepartoprenantojn.

Je la 10-a horo, la sonilo soniĝis, pli ol 60 personoj eniris en la kunvenejon, ĉiuj ridetis kun grandplezuro, ĉar sin trovis meze de la verdaj steloj, standardoj, oni certe sentis noblan feliĉon kaj novan atmosferon.

« En la mondon venis nova sento, tra la mondo... La Esperanto-kursanoj gaje kantis. Post la komenccparolado de k-do Lu Bi kaj informado pri la vivo de nia majstro de k-do Jan Lu Suj, nia fama, malnova k-do Hujuz (La estro de la plej granda ĵurnalo « Nan Chiau Jit Pao », neniu en la ĉina kultura cirklo ne scias pri li) ekstarigis kaj paroladis Esperante pri sia gajeco en la kunveno kaj bedaŭrindeco pro la morto de sia malnova amiko k-do Hou Chio, samtempe multe pri siaj spertoj koncerne al la praktika uzado de Esp. kaj la esp-lista sincereco, kiun li travivis dum sia restado en Eŭropo. Sekve, k-do C. Cen, Lju Pin, k.t.p. ankaŭ faris multajn paroladojn. Post la paroladoj oni tetrinkis, babiladis, kaj la Esp.-kursanoj esp-e konversaciis, kantis verslegadis, ĉu sole aŭ kolektive. Ho ! ĉiuj estis gajaj, agitaj, ridetaĵ. Finfine, k-dino Ŭu-Zuj In (S-rino Hou Chio, la lernejestro) paroladis, ke ŝi esperas la disvastigon de nia movado kaj plibonigon de nia laboro en estonteco, k.t.p. La kunveno disiĝis posttagmeze.

Nun nia grandcelo estas la preparo de la 60 jara-Jubileo de Esp. kaj samtempe okazigos la grandekspozicion Esp-an. Pro tio ni sincere esperas ke niaj k-doĵ en ĉiuj partoj de la mondo bonvolu sendi interŝanĝe aŭ donace al ni Esp-gazetojn, librojn, p. k., p. m., ilustritajn bildojn k.t.p. antaŭ ol Julio venont jare, por ke nia arango fruktedone sukcesos.

Verdan Saluton kaj Feliĉan Novjaron !

Tute Viaĵ Hou Chio Publika Lernejo, Esperanto-Rondo Singapura.

POR KOMENCANTOJ

LA SEP ETULOJ.

Estis en la montaro arbaro, kaj antaŭ ĝi estis herbejo. Je la rando, inter arbaro kaj herbejo, estis malgranda ĝardeno ? Kaj en la ĝardeno antaŭ la dometo estis tablo. Ĉirkaŭ ĝi staris sep ŝeĝoj. Sur la tablo jam estis preparataj sep teleroj, sep tasoĵ, sep kuleroj, sep forkoj kaj sep tranĉiloj. Ankaŭ kafujo kaj potoj kun manĝaĵo estis preparataj.

Vesperiĝis. La suno subiĝis, malaperis ? Kaj aŭdiĝis kantado : « Ni estas la etuloj, ni laboras en la minejoj, ni serĉas karbon kaj oron. Nun hejmen ni rapidas ». Aŭdiĝis paŝoj. Kaj envenis en sian hejmon sep etuloj, marŝante unu post la alia kaj portante laborilojn, fosilojn, hakilojn kaj malgrandajn lampetojn.

Ili venis al la tablo, rimarkis, ke io ne estis en ordo, kaj tuj demandis « Kiu manĝis per mia forko, kiu formanĝis mian panon, kiu trinkis el mia taso, kiu prenis da mia kuko, kiu sidis sur mia ŝeĝo ? ». Sed ili nenion trovis kaj trankvile kaj gaje finvespermanĝis.

Nun ili volis enitigi kaj eniris en la dometon, en la ĉambron, kie staris la sep litoj. Nun, kia surprizo ! en unu jam kuŝis iu. Knabino ! Ili vekis ŝin. Estis Negulino. Si rakontis al ili sian sorton. Kaj ŝi volis resti ĉe ili kaj

helpi al ili en la kuirejo kaj en la mastrumado. La etuloj ĝojis pri tio, ĉar ili jam ne havis patrinojn.

Nun restis Neĝulino ĉe la sep etuloj, bone kunis la mangajon, fikis vestaĵojn kaj prizorgis la sep etulojn. Estis bona kaj feliĉa tempo por ili ĉiuj. Sed ne longe.

Cu vi volas ion aŭdi pri Neĝulino ? Aŭ ĉu vi volas kanti kun la etuloj « Ni estas la etuloj... ! ».

LA HISTORIO DE NEGULINO

Neĝulino estis knabino. Ŝi havis belajn blankajn vestaĵojn kaj vivis ĉe la korto de l' reĝino, ĉar ŝi estis filino de l' mortinta reĝo. Sed la reĝino ne ŝatis Neĝulinon. La malbona reĝino dungis ĉasiston, por ke li ŝin mortigu.

La ĉasisto kondukis Neĝulinon en la barbaron kaj diris al ŝi « Nun faru viajn lastajn pensojn, mi devas vin mortigi ». Neĝulino ekpulis kaj petis pardonon, ĉar ŝi ja nenion malbonan estis farinta. La majuna ĉasisto tion ankaŭ sciis kaj diris al ŝi : « Foriru ĉiam rekten tra la arbaro al la montaro tie malantaŭe. Ne revenu, kaj fartu bone ! » Neĝulino dankis kaj foriris.

Ŝi migris, migradis la tutan tagon, grimpis la montojn, kaj vespere ŝi alvenis, malsatega, al la herbejo sur granda monto, kie estis la ĝardeno kun la hejmo de la sep etuloj.

Ŝi eniris esperante trovi ion por manĝi kaj restis tra la nokto. Kia surprizo ! en la ĝardeno estis tablo kun sep teleroj, sep manĝilaroj, sep taso, sep seĝoj ĉirkaŭis la tablon kaj en la kufujo estis kafo kun lakto, kaj en la potoj estis supo kun mangajo, pano estis preparita. Kion fari ? Ŝi malsatis, kaj kaj la mangajoj preparitaj allogis, invitis por manĝi. Nu, ŝi prenis tie panon ĉi-tie supon, ankaŭ terpomojn kaj legomon, ŝi manĝis, trinkis kafon, kaj post ripozo sur seĝo ŝi pensis ie enlitiĝi por dormi, ĉar nun ŝi estis laca, tre laca, ŝ ja migradis kaj grimpadis la tutan tagon.

Ŝi eniris la dometon kaj vidu ! en la ĉambro estis sep litoj. Ŝi ne sciis, ke ĉi tie laĝas la sep etuloj. Ŝi serĉis la liton la plej grandan, ĉar la litoj de etuloj estis magrandaj. Ŝi trovis ian, kiu estis sufiĉe granda por ŝu. Ŝi enlitiĝis, membris ankoraŭ je sia bona patrino mortinta kaj je ŝia bona patro, kiuj jam ne povis ŝin ŝirmi. Dankante, ke la tago estis feliĉa, ke ŝi trovis mangajojn kaj noktrestadon, ŝi ekdormis.

Post kelkaj horoj de bona dormo, ŝi vekigis kaj vidis la sep etulojn. Ili hejmen venis kaj volis ĉagreniĝi, ĉar ŝi, kiel fremduo, eniris sen anonco kian hejmon kaj enlitiĝis sen demando al la posedantoj. Sed ŝi rakontis sian sorton, ĉion, kion, ŝi travivis, kaj la etuloj havis bonan koron, ne forpelis ŝin kaj jesis, ke ŝi restu ĉe ili, ilin helpu kuiri la mangajojn kaj manstrumadu, dume ili laboros. Ŝi konsentis kaj venis feliĉaj tagoj por ŝi kaj la sep etuloj.

Mi rapide rakontas sian sorton. Sorĉistino venis, sendata de la reĝino, kaj donis al ŝi malbonan venenan pomon.

Ŝi ĝin manĝis kaj mortis. Nur ŝajne ŝi mortis ? Sed la sep etuloj tion ne sciis kaj opiniis, ke ŝi estas tute morta. Ili ŝin metis en ĉerkon kaj volis ŝin enterigi. Venis princo, kaj hazarde ili rimarkis, jam ŝin portante al la tombejo, ke ŝi vivas. Elfalas el la buŝo la malbona peco da pomo kaj nun estis gojo. Neĝulino fariĝis edzino de princo, bona patrino, kaj sep etuloj vizitis ofte kaj dancis kaj kantis ĉe Neĝulino.

rakontis Francisko MORAVEC, Gräfelfing.

Le Gérant : IRÈNE FINK.

mendu ĉe nia libro-servo
la ĵus eldonitan
interesan libron :

Emile ZOLA

prezo : 60. — fr. fr.

ATENTU !

Bv. korekti jenajn prezojn en nia libro-
listo :

La Aventuroj de Marteno Drake.

La Dormanto Vekiĝas.

La Naiveco de Pstro Brown.

Petrolo.

Pinokjo.

Romano pri Afrika Bieno.

Undino.

La Vojo Returne.

Ci-supre cititaj libroj kostas :

broŝ. : po 2 ŝ. 6 p.

bind. : po 5 ŝilingoj.

(daŭrigo de la libro-listo el 22 paĝo) :

La tuta Esperanto : Seppik.

Mr. Tot aĉetas mil okulojn.

Interpolola Konduto : Privat.

Jimmie Higgins : Sinclair.

La Fera Kalkanumo : London.

Vortoj de Kamarado Lanti.

Skizo de Ekonomia Geografio :

La Vojo al Scienco de Estonto.

Spegulo Homarana : Erkko.

O. N. U. kaj ESPERANTO

Karaj Ge-samideanoj. Bonvolu fiksi en vian memoron, tion, ke la petskriboj servos ne nur por interesigi O.N.U. pri nia afero.

La kolektado de petskriboj, unue starigos bonegan okazon propagandi.

Aliparte la rezultoj de tiu kolekto estos utiligitaj por altiri la atenton, ne nur de O.N.U., sed ankaŭ de multaj aliaj internaciaj organizaĵoj.

Esperantistoj, kaj simpatiuloj de Esperanto, ne hezitu kunlabori fervore por sukcesigi la petskrib-agadon.

Ni unuigu niajn fortojn por ke Esperanto fariĝu, baldaŭ la lingvo de la O.N.U.

La lingvo de bona harmonio inter la diverslingvanoj.

A.J.B.

De ĉiuj flankoj alvenas leteroj kun entuziasmaj vortoj. Al ĉiuj plaĉas nia revuo, ĉiuj unuanime promesas apogi nin kaj varbi novajn abonantojn. Antaŭ la apero de la unua n° de A.R. niĝ malnovaj abonantoj reabonas nian revuon por 1947, krom kelkaj, kiuj nun sciligas pri pago kaj abonigas siajn amikojn. Nia alvoko ne estis vana, ĝi trovis resonon en la koroj de niaj legantoj.

Kortuŝis nin la letero de nia amiko el Meknes, kiu skribas :

« *Mi ĵus ricevis* » A.R. « kaj vere mi tre tre ĝojis. Prezentu al vi mian ĝojan surprizon kiam mi ricevis la novevestitan, presitan revuon, hodiaŭ matene. Mi gratulas vin tutkore kaj sendas al vi, por ke A.R. daŭrigu sian vivon, ĉekmandaton je 500.. — fr. Kvankam mi ĉiam ne fartas bone kaj *multega* laboro, mi ankaŭ deziras alimaniere vin helpi. Diru al mi, kiajn artikolojn vi deziras, ke mi sendu por A.R.

Mi mendas ankaŭ librojn kaj du aliajn abonojn. Mi sendos la revuon, senpage al miaj eksterlandaj korespondantoj ».

Liaj vortoj de amiko, donas al ni novan forton daŭrigi nian laboron. Estas ankaŭ aliaj kiuj krom la abonpago sendis monon por helpi al A.R. ne estas nia iniciativo, tio venis spontanee de niaj legantoj, kiuj tiamaniere volas alkuraĝigi nin kaj subteni nian modestan financstaton.

Vi kara leganto, vi ankaŭ povas helpi nin fariĝinte abonanto. Per tiu gesto vi pruvos, ke vi aprobas nian laboron. Kaj vi kara abonanto, fariĝu ankaŭ subtenanto de via revuo, instigante viajn korespondantojn fariĝi abonanto de via « AFRIKA REVUO ». Krome ni invitas ĉiujn Esp. aŭtoroj, verkistoj kaj poetoj, kunlaboru al nia revuo, sendante interesajn artikolojn, novelojn, rakontojn kaj poemojn, scilgojn el E. — movado kaj informojn pri ĉio, kio povas interesi klaran leganton.

Al ĉiuj ni petas sciigu al ni la adresojn de viaj amikoj, kunklubanoj kaj korespondantoj, kiujn vi supozas interesigi pri nia revuo. Por faciligi al vi la pagon de abonkatizo, ni donas al vi la liston de niaj perantoj kaj delegitoj de I.E.L. al kiuj bv. sendi la monon. Tiu, kiu povas, sendu al ni rekte la kotizon aŭ respondkuponon :

LA TABELO KUN NOMOJ DE PERANTOJ, troviĝas sur 29 paĝo.

KORESPONDU !

Publikigo de anonco pri korespondo — kostas 3 internaciaj poŝtaj respond — ku ponoj por du-linia anonco, ĉiu plua linio : 1 int. resp-kuponon. Por abonantoj la publikigo de anonco pri korespondo estas senpaga.

MALLONGIGOJ : dez. : deziras. Kor. : korespondi. f-ino : fraŭlino ; interŝ. interŝanĝas ; kĉl. : kun ĉiuj landoj ; pĉt. : pri ĉiuj temoj. PI. : poŝtkarto ilustrita ; PM poŝtmarkoj ; S-ino : sinjorino ; s-ro : sinjoro. D-ro : doktoro ; prof. : profesoro.

AUSTRUJO. S-ro H. Halik, Hackerstr 63. **POLTEN SPRATZERN,** Nider ; O. dez. interŝ. IP.

BELGUJO. S-ro G. Bekrom, **ANDERLECHT,** rue Tolstoï N° 6 dez. kor. kĉl.

BULGARUJO. S-ro Vasil T. Sicaĉev meblisto, str. « Pirotka » N° 6 **BURGAS,** dez. kor. kun marokaj gesamideanoj pri vivkondiĉoj, interŝ. PM. kaj IP.

ĈEKOSLOVAKUJO. Ladislav Kyseky Prohazinĉe N° 10, **OSTROOVA-HRABUVKA,** dez. kor. kun marokaj samideanoj.

DANUJO. S-ro Jens Erh. Graversgaard, **RONDE,** Kursus Jutland. dez. kor.

FRANCUJO. S-ro Marlen Meynot, **MONTLUÇON,** rue Notre-Dame 9 dez. kor.

GERMANUJO. (Amerika zono) S-ro Georg Hechler V. **GROSS-ZIMMERN,** Georenhäuserweg 12 dez. kor.

GERMANUJO (Soveta zono) S-ro Walter Rahn (3) 1. Gastrow Meckl, Hageböckerstrasse 44 bei Bübring dez. kor. por siaj E-grupanoj. 2. S-ro H. Schmidt, (10) **DRESDEN** Dohnaerstrasse N° 47, dez. kor. ĉiuj 1.

HUNGARUJO. S-ino S. Hayden Naghy, Cukorgyar, lapošvar dez. kor.

JUGOSLAVUJO. S-ro Lednicki, Kaĉiĉeva 26, Tehniĉki fakultet **ZAGREB,** dez. kor.

KOLUMBIO. S-ro I. Nunez, Cali, Carma M.D. N° 19-41 via New York, dez. kor. per IP. kaj leteroj.

MAROKO. F-ino Alice Oouazana, (18-jara instruistino - 1) 5, rue des Ecoles, **MARRAKECH,** dez. kor. pĉt. kĉl..

2) S-ro N. Lopez de Arias, 100, rue d'Aviation Française Casablanca, dez. kor. 22-jara mekanikisto.

3. S-ino Marie Garnier, 14, rue Franĉnet d'Esperey, Casa dez. kor.

3. S-ro Charles Rouzoul, P.T.T.-kontroloro, dez. kor. nur kun samfakaj samideanoj, pri la profesio en la tuta mondo, adreso : 162, rue Blaise Pascal, Casablanca.

4. S-ro Georges Buan, 77-jara archi-

tekto dez. kor. kun fakuloj. Casablanca, 41, rue d'Aviation F-se.

NEDERLANDO. S-ro S. Zegel, Oudchild 258, **INSULO TEXEL** serĉas kontakton kun ge-roj el Afriko, kaj Madagaskaro. Resp. garantiata.

NOVZELANDO. F-ino J. Rogerson ; 17 Musore St., Ngaio, Wellington N 4. dez. kor. pri stenografado, libroj, kutimij, muziko kaj PM.

PORTUGALUJO. S-ro J. Mnrias, LISBOA, rue do Alecrim 47-3-0 dez. kor.

RUMANUJO. S-ro D. Vanya, Oradea-mare, str. D. T. Vladimiresku 12 dez. kor. kĉl.

PALESTINO. S-ro Grigor G. Choutoff, **MAABAROT,** dez. kor. kun gelaboristoj terkulturiŝtoj, presipe pri komunuma vivarto kaj kooperado. Ankaŭ interŝ. P.M.

SVEDUJO. S-ro Ekström, Allegt N° 57. **BORAS,** dez. kor.

USONO. S-ro H.K. Ver Ploeg, 1384 Cherry Ave, **LONG BEAC 4, CALIFORNIA.** U.S.A. dez. kor.

SIAMO. S-ro Wen Chiching, Huay Boon Bookstore, near Boon Mee Dispensary, Sam Yaek, E. **BANGKOK** dez. interŝ. PM. kun Marokano.

GERMANUJO. S-ro Friedrich Hahn, Beĝinenland 20. **BREMEN,** dez. kor. kun samideanoj ĉiulandaj.

SVEDUJO. **FILATELISTOJ** en ĉiuj landoj. Sendu al mi 20 PM. de via lando kaj vi ricevos 60 PM. de skandinavaj landoj rekompence. Interŝanĝas IP. ktp. S-ro Kjell B. Homvik, K N A R E D.

HUNGARUJO. S-ro P. Gyucha. **NEKESOSABA,** VI, Kälvin u. 31. 22-jara spickomerca komizo, dez. kor. perletere aŭ PI.

FRANCUJO. S-ro P. Fonteneau, 5, rue Perrod ; **LYON (4e),** del de I.E.L. dez. kor. pri presarto, k. interŝ. nur art. presajoj. (Mensiu ĉiam, ke adreso vi troviĝas en **AFRIKA REVUO**).

LISTO de SUBTENANTOJ

« por ke A.R. vivu kaj kresku »

Meknesa sekcio :	100.
ANONEMULO :	500.
F-ino Leal, Casa :	400.
S-ro Brunet, Paris :	45.
F-ino Bourgon, Casa :	20.
S-ro Melo, Drancy :	22.
S-ro Guerra, Casa :	30.
S-ro Para Tunis :	56.

Société Nationale des Entreprises de Presse
Langres. — Imp. Moderne

1^{er} trimestre 1947

